unu piedon por tuŝi ŝin. "Ho, vi dorlotaĵeto" diris ŝi en sia plej dorlota voĉo, kaj penis fajfi al ĝi. Sed interne ŝi tre timis pensante ke ĝi eble estas malsata, kaj en tiu okazo povas formanĝi ŝin, malgraŭ la dorloto.

Apenaŭ konsciante kion ŝi faras, ŝi levis malgrandan branĉeton kaj tenis ĝin antaŭ la hundido, kiu tuj saltis en la aeron kun laŭta ĝojbojo, kaj ĵetinte sin sur la branĉeto ŝajnigis mortskui ĝin.

Por eviti esti piedpremata, Alicio gardis sin malantaŭ granda kardo. Tuj kiam ŝi reaperis sur la alia flanko, branĉeto en mano, la hundido denove atakis, kaj pro ĝia arda deziro ĝin kapti, tute renversiĝis. Alicio, pensante en si ke tio estas kvazaŭ oni ludus kun tirĉevalo, kaj en ĉiu momento atendante ke ŝi estos piedpremata, ree ĉirkaŭkuris la kardon. La hundido, siaparte, komencis fari rapide tutan serion da sinĵetoj; ĉiufoje ĝi nur malmulte antaŭen kuris, sed multe kuris malantaŭen. Senĉese ĝi raŭke bojadis, ĝis fine ĝi sidiĝis malproksime, kaj spiregadis, kun lango elpendiĝanta kaj la grandaj okuloj duonfermitaj.

Tiu momento ŝajnis al Alicio oportuna por forkuro. Ŝi tuj ekkuris, kaj ne ĉesis kuradi ĝis ŝi sentis sin laca kaj spireganta, kaj (pro la longa interspaco) la bojado fariĝis apenaŭ aŭdebla.

"Tamen ĝi estis tre bela hundeto" diris



Alicio apogante sin kontraŭ r
ripozi; kaj ventumante sin p
folioj ŝi daŭrigis: "Mi tre vol
lertfaraĵojn, se nur mi estus .
Ho, preskaŭ mi forgesis ke mi
Mi konsideru kion fari; mi k
estos necese ke mi trinku aŭ m
jen la ĉefa demando: kion trink

Alicio ĉirkaŭrigardis sur ĉi
herbtrunketojn, sed nenion ŝi v
aspekton esti la taŭga manĝaĵo.
ŝi, staris granda fungo, egale al
Esplorinte ĝin, sube kaj ĉirka
esplori ankaŭ la supron. Lev
piedpintojn, ŝi havis la okuloj
rando. Sidantan sur la supro
falditaj, ŝi ekvidis grandan bl
kiu serene fumas longan turkan

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI